



INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ

Etnismo

N-ro 106 - 31.12.2020

**FULMIS MILITO
EN ALTA KARABAŬO**

**MALFERMIĜIS NACIA
CENTRO POR REVIVIGO
DE LA AJNUA KULTURO**

**SUBPREMO PLENE
TRAFAS INTERNAN
MONGOLION**



Prapopoloj fronte la kronviruson

LA LIVONA LINGVO, ĈU MALAPERINTA, ĈU MODELO POR REVIGLIGO DE MALAPERANTAJ LINGVOJ?

Etnismo

N-ro 106 - 31.12.2020



Foto de la kovrilo: Apu Gomes / AFP

ELDONISTA LETERO

► Tiom danĝera mondo

3

PLUJ VORTOJ PRI LA PRAPOPOLOJ FRONTE LA KRONVIRUSON

4

IKEL-INFORMILO N-RO 84

10

KOREKTO

10

FULMIS MILITO EN ALTA KARABAĤO/ARCAĤO

11

LA LIVONA LINGVO, ĈU MALAPERINTA,
ĈU MODELO POR REVIGLIGO DE MALAPERANTAJ LINGVOJ?

16

SEKVE EL...

20

KONCIZE EL...

21

MALFERMIĜIS NACIA CENTRO POR REVIVIGO
DE LA AJNUA KULTURO

22

SUBPREMO PLENE TRAFAS INTERNAN MONGOLION

23

La membroj de la **Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL)** ricevas **Etnismo**-n sen krompago, normale 2 kajerojn de minimume 36 paĝoj. Unuopa ekzemplero de simpla numero kostas 5 €. Ĉiuj eroj de la **“IKEL-Informilo”** estas oficialaĵoj. La aŭtoroj ne ricevas honorarion. La redaktoro rezervas al si la rajton ne publikigi, mallongigi kaj lingve korekti la kontribuojn.

La artikoloj publikigitaj en **Etnismo** ne nepre esprimas starpunkton de **IKEL**, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Estraro:

- **Prezidanto: Alain FAVRE** (savoĵano),
Damo de Vi, allée du Quart d'Amo 171,
FR-74140 Chens-sur-Léman, tel: ++33682093845,
retadreso: afavre1@hotmail.com;
- **Vicprezidanto kaj redaktisto: Nicole MARGOT** (vaŭdanino),
ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne
tel: + 41 21 653 14 67, retadreso: n.margot@bluewin.ch
- **Grafiko: Ferriol MACIP i BONET** (kataluno)
Carrer de la Font Florida, 86, 1r 1a, 08004 Barcelona
Tel: +34 625 469 373, retadreso: farri@mac.com
- **Sekretario: Nikolas XIL CARVALHO** (asturleono),
48 postakutxa. 20400 Tolosa. Gipuzkoa. Eŭskio/EH
tel: ++ 34 630 44 68 63, retadreso: fokomelo.makolji@gmail.com
- **Kasisto: Xabier RICO ITURRIOTZ** (eŭsko),
Manuel Iradier, 22-1-ekz. ES-01005 Gasteiz,
Euskal Herria-Eŭskio, retadreso: xabirico@outlook.com
- **Rilatoj kun esperanto-gazetoj. Reviziado:**
István ERTL (hungaro),
22, rue Fautelfiels, LU-7355 Helmdange, Luksemburgio,
tel. ++ 352 2633-2659, retadreso: istvan.ertl@gmail.com
- **Kunrevizianto: Nancy FONTANNAZ**
- **Estrarano: Hèctor ALÒS i FONT** (kataluno),
Mir pr. 15-55, RU-428024 Shupashkar, Ĉuvaŝio, Rusia Federacio
retadreso: h.alos@esperanto.cat
- **Sociaj retoj: Aleksandr BLINOV** (ĉuvaŝo)

• **Retejo:** www.etnismo.org• **Forumo:** etnismo@googlegroups.com

Kotizoj kaj kontoj:

Kotizo	eŭroj	
Normala	20.00	La rabatitan membrecon rajtas ĝui ĉiu persono, kiu aŭ loĝas en (eks)socialisma aŭ “tria-monda” lando, aŭ estas studento aŭ emerito.
Subtenanta	30.00	
Rabatita	10.00	

Bonvolu ĝiri vian **IKEL**-kotizon **ekskluzive** al la konto de **IKEL** ĉe **UEA** (kodo: **ikel-y**), **UNIVERSALA ESPERANTO**- (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam). Vi povas ankaŭ sendi retmesaĝon al tiu ĉi adreso: financoj@co.uea.org por pagi rekte el via UEA-konto.

Aliaj pageblecoj:

- **ABN-Amro Bank**, Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66 ABNA 0426 0515 99,
BIC/SWIFT: ABNANL2A).
Ĉiukaze indiku **“ikel-y”** kaj la celatan jaron. Bonvolu nepre certigi, ke via kompleta kotizo alvenu al la **IKEL**-konto: **IKEL** absolute ne povas transpreni kiajn ajn banko- aŭ peradkostojn!
- **Pago per PayPal konto** al Xabier Rico Iturriotz,
retpoŝto xabirico@outlook.com

Perantoj:

- **FRANCIO** eblas sendi ĉekojn al *Alain Favre*.
(Poŝtadreso ĉi-supre.)
- **NORVEGIO** oficejo@esperanto.no
- **KATALUNIO** Sandra Vives: sandra@esperanto.cat

Eblas reklami en Etnismo!

- **Anonctarifo:** (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6 p. 15.
- Rabato por IKEL-membroj: 10 %.

Venonta redaktolimdato: 30an de aprilo 2021

Tiom danĝera mondo

Alain Favre

Fine de 2020 la virusa plago, kiu unuafoje en la historio koncernas samtempe la tutan homaron, ankoraŭ ne malfortiĝis kaj devigas plej multajn ŝtatojn fari drastajn decidojn. Sed ofte etaj praaj popoloj estas flankelastaj, ili devas kalkuli pri si mem por rezisti al la pandemio, tiom pli, ke iuj registaroj profitas la okazon por ankoraŭ pli subpremi ilin esperante, post efektivigo de fakta genocido, disponi pri novaj teritorioj plene ekspluateblaj. Pri tio jam temis en la antaŭa numero, kaj ĉi-foje la situacio de tiuj etaj etnoj estos multe pli detalita.

Sed etnecido, foje eĉ genocido povas koncerni pli grandajn popolojn. Jam de pluraj jaroj ni parolas pri la trista sorto de la ujguroj, tjurka etno de Ĉinio, kies mistraktado nun komencas esti bone konata eksterlande. Malpermeso de lingvo kaj religio, internigo en “reedukajn kampojn”, trudlaboro interalie en kotonkampoj (kiel antaŭe por afrikdevenaj homoj en diversaj landoj de Ameriko!), steriligo de virinoj... Jen kelkaj hororoj, pri kiuj oni nun povas legi en la gazetararo, almenaŭ en okcidentaj landoj. Tio tute ne timigas la ĉinan registaron kaj, en tiu ĉi numero, temos pri alia malplimulto de la sama lando, nome la mongoloj, kies etnaj rajtoj – kvankam konstitucie agnoskitaj – estas nun forte atakataj.

Sed reagoj kontraŭ tiu terura politiko de Ĉinio tute ne es-



tas ĝeneralaj. Tiu ekonomie ege potenca lando estas konsiderata kiel ebla helpanto far multaj ŝtatoj, kiuj troviĝas en financa kaĉo. Pekino povas libere daŭrigi subpremon de malplimultanoj, enkarcerigi tro scivolemajn kaj talentajn ĵurnalistojn, malaperigi eĉ tre konatajn kompaniestrojn, plej intime kontroli siajn civitanojn, rekapti Honkongon malrespekte al internaciaj traktatoj, minaci Tajvanon (insulan landon, kiu cetere bone montras, ke ĉina identeco kaj demokratio tute povas kongrui)... ĝi daŭre ricevos subtenantojn.

Inter ili troviĝas la nuna otomana prezidento, heroldo de tut-tjurkismo, kiu ĵus planis kun la

azerbajĝana diktatoro sukcesan militan operacon kontraŭ rezistema valo armena, sed tute ne kritikas la abomenindaĵojn kontraŭ islamaj tjurkoj en Ŝingjango. La turka ekonomio ja sinkas kaj estus bone aĉeti amase ĉinan vakcinojn je sufiĉe malalta prezo...

Pri tio kaj multaj aliaj okazaĵoj (foje pli pozitivaj!) vi povos legi en tiu ĉi numero.

Restas do al mi sendi bondeziron: ke 2021 estu jaro de resaniĝo, ne nur de misterdevena kaj tre disvastiĝema biologia viruso, sed ankaŭ jaro de regreso por alia viruso, tiu de barbareco, de malhumaneco, kiu ankoraŭ pli danĝere emas plagi la mondon. ■

Jam de pluraj jaroj ni parolas pri la trista sorto de la ujguroj, tjurka etno de Ĉinio, kies mistraktado nun komencas esti bone konata eksterlande.

Pluaj vortoj pri la prapopoloj fronte la kronviruson

Nicole Margot



APU GOMES/AFIP

En la lasta numero de *Etnismo* (n-ro 105, 30.06.20) ni aperigis artikolon el diversaj fontoj pri la brazilaj prapopoloj fronte al la kronviruso. Ĉi-numere ni deziras daŭrigi tiun informadon laŭ pli aktualaj in-

La pandemio kreskigas ĉiujn malbonojn de Amazonio, fragiligante ties unuajn defendantojn, la aŭtoktonojn.

formoj, kaj malfermiĝante al ĉiuj prapopoloj.

En la lasta numero ni vidis, ke la pandemio tuŝis la amazoniajn aŭtoktonojn en situacio jam drama kaŭze de la nuna ekstremdekstra politiko de *Jair Bolsonaro*, kiu ne hezitis nomi en februaro evangeliisman misiiston en la De-

partemento por la nekontaktitaj popoloj ene de la Nacia Fondaĵo de la indianoj (*FUNAI*) kaj kuraĝigis ĉiaspecajn koloniantojn, arbohakistojn, adeptojn de industria agrikulturo kaj bredado, orserĉantojn kaj ministojn, invadi la teritoriojn rezervitajn al la praloĝantoj: La sanitara krizo eĉ

pli malfortigis la kontrolojn kaj malfermis breĉojn al la agoj de la invadintoj. Al tio aldoniĝas nun la fuĝo de homoj, kiuj, timante la viruson, forlasas la urbojn por rifuĝi en la vilaĝoj kaj la kamparaj areoj. Sed la aŭtoktonaj popoloj rapide kaj firme agis por malhelpi *Kovimo-19* eniri la vilaĝojn.

Lastatempaj antropologiaj esploroj

La antropologo Irène Bellier, direktorino de esplorado en CNRS (*Centre National de Recherches Scientifiques*)¹ kaj vicprezidanto de la Internacia Komisiono por la aŭtoktonaj popoloj (*Groupe International de Travail pour les Peuples Autochtones, GITPA*)², esploris pri la influo de *Kovimo-19* sur tiujn loĝantarojn kaj estis intervjuita septembre en la ĵurnalo de CNRS. Komence de la intervjuo Irène Bellier rememorigis, ke Unuiĝintaj Nacioj kreis la terminon “aŭtoktonaj popoloj” en 1970, por nomi popolojn, naciojn kaj komunumojn, kiuj okupis teritoriojn antaŭ la alveno de ties unuaj koloniantoj.

La raporto celis la efikojn de la viruso sur tiujn vundeblajn sociojn pro demografia malforto kaj socia fragilo. La aŭtorino provis kompreni, kiel la aŭtoktonaj popoloj perceptas la problemon. Tiucele ŝi kolektis datumojn pri la sep grandaj regionoj, kie troviĝas aŭtoktonoj (Afriko, Nord-Ameriko, Sud-Ameriko kaj Karibio, Arkto, Azio, Oceanio kaj Rusa Federacio) tra la sociaj retoj kaj pluraj retaj amaskomunikiloj en la franca, angla kaj hispana lingvoj, kaj ankaŭ tra rektaj atestoj de iuj komunumoj el Sud-Ameriko, sen forgesi datumojn kolektitajn de internaciaj organizoj laborantaj pri la aŭtoktonaj popoloj, kiel la Internacia Laborgrupo pri Aŭtoktonaj Aferoj (*Interna-*

tional Work Group for Indigenous Affairs IWGIA)³.

Ŝi unue konstatis, ke dum la kronviruso prezentas novan situacion por la tuta homaro, la mortoprocentaĵo estas pli alta ĉe plejmulto de la aŭtoktonoj pro iliaj malfavoraj sociekonomiaj kondiĉoj. Plie, por la du Amerikoj, tiu pandemio revekas memoron pri la amasmortigaj epidemioj de la pasinto, dum kiuj la indiana loĝantaro perdis 90 % de siaj originaj membroj pro epidemioj de variolo, de gripo aŭ de morbilo, al kiuj tiuj popoloj estis konfrontitaj.

En Usono, la supermortado observita ĉe la “amerikaj indiĝenoj”, kiel navahoj aŭ ĉeĵenoj, rezultas el la foresto de akvo-punktoj proksime al la loĝlokoj kaj el la malofteco de hospitalaj centroj en la indianaj rezervejoj. Aliflanke, la indianoj de la Nordo, same kiel la indiĝenoj de Aŭstralio, ankaŭ prezentas faktorojn kunmortigajn (kormalsanojn, trodikecon, diabeton, ktp.), kiu afekcias ilian kapablon rezisti al la viruso. Fine, ĉiuj aŭtoktonoj de la planedo suferas samtempe pro aliaj gravaj malsanoj kiel malario, dengo aŭ tuberkulozo.

Por defendi sin kontraŭ la malsano multaj komunumoj decidis bloki la aliron al sia teritorio, eĉ antaŭ ol la fermo de la limoj estis dekretita nacinivele. Tre rapide post la komenco de la epidemio ili provis ekscii, kiuj estas la potencialaj enirpunktoj de la viruso sur iliaj teritorioj.

En Sud-Ameriko, la koloniantoj, la oresploristoj, la laboristoj por la petrola industrio estis signalitaj kaj al ili estis malpermesite aliri la vilaĝojn. La aŭtoktonoj veturintaj en la grandajn urbajn centrojn por trovi tie laboron provis reveni en siajn komunumojn sed devis observi kvarantenan periodon ekster la vilaĝo antaŭ ol rajti eniri. Tiuj

popoloj reaktivigis malnovan praktikon por ĉiuj, kiuj revenas el vojaĝo al urbo, memore al antaŭaj epidemioj enportitaj de personoj eksteraj al la komunumo. Tiel, la janomamoj de Brazilo aŭ la *Orang Rimba* popolo en la indonezia insulo Sumatro elektis rifuĝi meze de la arbaro, for de la infektaj centroj.

Ĉe la maihunoj de Peruo, la decido samtempe fermi la teritorion kaj apliki la distancigajn gestojn, kaj aliflanke kontroli la iradojn al la urbo por aĉeti medikamentojn, ebligis limigi la disvastigon de la epidemio al la popolo, kiu nombras nur kvincent individuojn. Sed plej ofte, kiam komunumo prenis la iniciaton kontroli la aliron al sia teritorio, tiu ĉi dispono malfeliĉe ne estis tre respektata de la neaŭtoktonoj aŭ de la registaraj aŭtoritatoj.

Pri naturmedicino ...

La aŭtoktonaj popoloj feliĉe posedas tradiciajn konojn pri naturmedicino, kiujn ili ekuzas por sin protekti kontraŭ la kronviruso. Konfrontitaj al foresto de testoj, de medikamentoj aŭ de produktoj malinfektigaj, iuj komunumoj efektive disponigas kuracilojn por stimuli la imunajn defendojn de la organismo kaj protekti la spiran aparaton kontraŭ la infektoj. Agante per infuzaĵo, inhalajo aŭ tra ŝvitego, la uzoj de la plantoj respondas al tradiciaj kuracmanieroj ĉe multaj aŭtoktonaj popoloj. Iel la epidemio *Kovimo-19* relanĉis la sinturon de la aŭtoktonoj al kuracaj plantoj.

... kaj pri la tero

Plie la aŭtoktonaj popoloj konscias pri la tre forta ligo inter la “sano” de la tero kaj la sano de la individuoj. Ili konscias, ke ekspluatmanieroj, kiel senarbarigo, min-eja kaj petrola elpumpado aŭ intensivaj kulturoj de sojo, estas fatalaj por la sano de iliaj teritorioj

1. lejournel.cnrs.fr.

2. www.gitpa.org.

3. iwgia.org/en

*Membroj de la
guaraa popolo, kiuj
fuĝis el Venezuelo
en 2017 kaj 2018
pro gravaj perfortoj
kaj malrespektoj
de la homaj rajtoj
kaj vivas en izolita
landlima regiono
en la nordo de
Brazilo.*



FELIPE IRVALDO / AFRUN

kaj, konsekvence, por tiu de la personoj, kiuj vivas tie. En Ameriko la malsano estas perceptita kiel signo de malordo, ligita al la rompo de ekvilibroj inter “naturo” kaj “kulturo”. Laŭ la mapuĉoj el Ĉilio, tiu epidemio estas la rezulto de leĝorompoj sur la sanktaj spacoj, kiuj estas la maro, la montoj, la lagoj kaj la riveroj, sekve al ties industria ekspluatado.

Kiel ni menciis en la pasinta artikolo pri brazilaj aŭtoktonoj, Irène Bellier konfirmas, ke, kaŭze de la kronviruso, pluraj projektoj intencantaj ekspluati la naturajn rimedojn de la aŭtoktonaj teritorioj ekfunkciis sen ajna antaŭa konsulto de la koncernataj popoloj. Ekde la komenco de la pandemio, la perforto cetere nur pli kreskis en iliaj vivlokoj. Tamen la internacia rajto kaj, ekde 2007, la deklaro de la Unuiĝintaj Nacioj pri la rajtoj de la aŭtoktonaj popoloj, invitas la ŝtatojn konsulti tiujn loĝantarojn pri ĉiuj projektoj riskantaj influi ilian vivmanieron, nome por ricevi ilian konsenton. Sed pro la pandemio, tiuj procezoj estis haltigitaj. Nome de “ekonomia disvolviĝo”, mul-

taj projektoj pri mineja, petrola, agro-industria ekspluatado, povis trude komenciĝi kaj Francio ne estas escepto en tiu situacio. Lastan majon la departementa komisiono pri minejoj en Gujano donis favoran opinion al nova projekto de subĉiela orminejo, kaj tion aprobis la administracia tribunalo, sen fari al si la penon konsulti la aŭtoktonojn vivantajn en la koncernata regiono. (Vidu samnumeran artikolon en la rubriko Sekve el ... «Francia Gujano – Ormonto resurektis»).

Novaĵoj el Brazilo

Komence de junio la kajapoa tribestro Raoni Metuktire⁴, emblema reprezentanto de la brazilaj popoloj, akuzis dum intervjuo la brazilan ekstremdekstran prezidenton Jair Bolsonaro, ke li profitas la kronvirusan krizon por malaperigi la brazilan prapopolon.

Same parolas la indiĝena aso-

cio APIB (*Articulação dos Povos Indígenas do Brasil*), kiu aperigis en novembro raporton 108paĝan pri la naŭ unuaj monatoj de la pandemio⁵. El ĝi ni ekscias, ke dum en novembro 2020 Brazilo estis la lando de la mondo kun plej multe da mortintoj pro la viruso, la indiĝenoj estis la plej tuŝitaj kun pli ol 41 mil homoj trafataj de la viruso, kiu tuŝis duonon de la 305 brazilaj triboj. La nombro de mortintoj ĉe tiuj triboj atingis 880 en naŭ monatoj. «Tragedio neniam spertita en la nuna historio. Multe pli ol la nombroj, gravas, ke foriris niaj ŝamanoj, niaj preĝantoj, akuŝistinoj, pliaĝuloj kaj estroj. Ni perdis niajn pliaĝulojn, kiuj konservis la memorojn de niaj prapatroj, la gardantojn de scio, de kantoj, de preĝoj, de nia spiriteco. Pro la viruso forlasis nin gvidantoj, kiuj dediĉis sian vivon al lukto por defendi la teritoriojn, la integrecon fizikan kaj kulturan de niaj vilaĝoj. Ni suferis funebras pri ĉi tiu tragedio, kiu influas ne nur nin, la indiĝenojn, sed la tu-

4. Laŭ la revuo *Ikewan* de ICRA International <ICRA International>, Raoni Metuktire, kiu eniras sian 90an jaron, estis trafita de la kronviruso sed feliĉe supervivis al tiu ĉi malsano.

5. emergenciaindigena.apiboficial.org

tan homaron.» Ne nur la brazilaj indiĝenoj estas koncernataj sed ankaŭ membroj de la guaraa popolo⁶, kiuj fuĝis el Venezuelo en 2017 kaj 2018 pro gravaj perfortoj kaj malrespektoj de la homaj rajtoj kaj vivas en izolita landlima regiono en la nordo de Brazilo. Por ili, indianoj kaj rifuĝintoj, la malfacilaĵoj duobliĝas. Multaj el ili vivas en necerta kaj nesalubra situacio, kie tute ne eblas respekti sanitarajn distancon kaj higienon. Ili ĝenerale vivas per la vendo de siaj manfaritaj produktoj, kaj tio ne plu eblas dum la pandemio. Tiel aldoniĝas financa situacio ege malfacila⁷.

«Ni asertas, ke la perforto kontraŭ la aŭtoktonaj popoloj dum la pandemio estis kuraĝigita de *Bolsonaro*. Per rasismaj paroladoj kaj malamo, li instigas al perforto kontraŭ la indianaj komunumoj kaj paralizas la ŝtaton en sia devigo protekti kaj garantiĝi iliajn rajtojn. Li provas ekspluati la “ŝancon” de ĉi tiu krizo por daŭrigi serion de dekretoj, preskriboj, normaj instrukcioj, provizoraj rimedoj kaj leĝproponoj leĝigantaj krimojn kaj malpliigantaj la konstituciajn rajtojn de indiĝenaj popoloj.»

De marto ĝis oktobro, pli ol 200 fundamentaj malobservoj al la homaj rajtoj kontraŭ indiĝenaj popoloj estis registritaj. Alarma situacio, kiu pligravigas ĉiutage. En ĉi tiu terura etoso, la federacia registaro instigas la agadon de terkaptistoj, invadantoj kaj multaj aliaj krimuloj, neniam metataj en



MARCELO CAMARGO/AGÊNCIA BRASIL

kvaranteno, kiuj daŭre antaŭeniras en la indiĝenaj teritorioj, uzante la nunan tragedion. «La fajro kaj senarbarigo, efektivigitaj en 2020, ne povas esti neitaj kontraŭ la pruvoj de satelitaj bildoj kaj kontraŭ la ĉielo konstante kovrita de iu nebulo. Ŝajnas, ke en la flamoj ili vidas profiton, kaj en fagitaj arboj estas nur avideco...»

APIB kaj ĝiaj bazaj organizaĵoj daŭre laboras ĉiutage por plifortigi, protekti kaj kontroli la indiĝenajn sanprofesiulojn. La Speciala Sekretariejo por Indiĝena Sano (SESAI) rezultas el la lukto kaj mobilizado de APIB kaj de la tuta indiĝena movado. «Ni kreis la planon “Indiĝena Krizo” pro la aktiva preterlaso de la Federacia Registaro kontraŭ la viruso. Ni ne volas anstataŭi la ŝtaton en ties rolo, male, ni daŭre postulas la efektivigon de publikaj politikoj, kiuj garantias niajn rajtojn. Sed ni ankaŭ ne povas resti kun brakoj krucitaj. Tiusence ni povis havigi rimedojn kaj materialojn por ekipi Specialajn Indiĝenajn Sanitarajn Distriktojn (DSEI) en pluraj ŝtatoj. Ni liveras testan ekipaĵon, higienajn materialojn, personan protektan ekipaĵon, oksigenon, kaj ni ebligas la instal-

adon de Indiĝenaj Urĝkuracadaĵ Unuoj (UAPI) en diversaj teritorioj. Laŭ propra iniciato, ni kreis kaj konservis centojn da sanitaraj baroj por malhelpi la viruson atingi la komunumojn. Disponoj, kiujn la Federacia Registaro ne nur neglektas sed provas saboti diversmaniere. Ĉi tiu baza agado, kiun niaj komunumoj plenumas memstare, estas esenca por minimumigi la efikojn de la nova kronviruso inter niaj familioj. Je niaj bazoj ni daŭre rezistas, inspiritaj ĉefe de la forto de indiĝenaj virinoj kaj de niaj prapatroj. Ni prizorgas la teron kaj fortigas nin per la arbaroj, riveroj, preĝoj kaj niaj tradiciaj medikamentoj.»

La indiĝena asocio turnis sin al la tribunalo por defendi siajn rajtojn garantiitajn de la Federala Konstitucio ekde 1988, kaj dum la lastaj ok monatoj la asocio provokis ĝin per agadoj. Ĝi sukcesis antaŭ la Federacia Supera Kortumo (STF), kiu devigis la Federacian Registaron plenumi sian devon protekti indiĝenajn popolojn en la kunteksto de la pandemio. Sed tiun decidon de la Supera Kortumo ankoraŭ ne plenumis *Bolsonaro*.

Indiĝena asocio APIB asertas, ke la perforto kontraŭ la aŭtoktonaj popoloj dum la pandemio estis kuraĝigita de la brazila prezidento Jair Bolsonaro. «Per rasismaj paroladoj kaj malamo, li instigas al perforto kontraŭ la indianaj komunumoj kaj paralizas la ŝtaton en sia devigo protekti kaj garantiĝi iliajn rajtojn. Li provas ekspluati la “ŝancon” de ĉi tiu krizo por daŭrigi serion de dekretoj, preskriboj, normaj instrukcioj, provizoraj rimedoj kaj leĝproponoj leĝigantaj krimojn kaj malpliigantaj la konstituciajn rajtojn de indiĝenaj popoloj.»

6. La guaraoj estas indiĝena amerika etno loĝanta en nordorienta Venezuelo kaj okcidenta Gujano. Hispanlingve oni ofte uzas *guaraao*, *guarauno*, *warao*, *waroa* kaj *warrau*. La termino *warao*, nuntempe uzata en la hispana, franca kaj angla, tradukeblas kiel “la boato-homoj”, pro la dumviva kaj intima rilato de la etnanoj al la akvo. Plejparto de la proksimume 20 000 etnanoj loĝas en la delta regiono de la rivero Orinoko en Venezuelo, kaj aldone ekzistas pli malgrandaj nombroj en najbara Gujano kaj Surinamo. (El eo.wikipedia.org/wiki/Guaraoj).

7. HCR - *Le coronavirus menace les peuples autochtones vénézuéliens réfugiés au Brésil* (unhcr.org)



Sergio Muxi Tembe,
estro de la vilaĝo
Tekohaw, staras kun
membroj de sia tribo
atendante,
ke policano alvenu
al la indiĝena
rezervejo Alto Rio
Guama en la paraa
ŝtato, merkrede la
4an de septembro
2019. «Ni ne volas
esti mortigitaj de
kugloj.» diris li. «Ni
volas, ke la federacia
registaro plenumu
sian respondecon kaj
garantiu nian rajton
vivi en niaj landoj,
vivi en paco.»

La sukceso de la brazila popolo "tembe"⁸

Por kontrastigi tiun malgajan raporton ni rakontos al vi ĝojigan eventon publikigitan sur la retejo de *Radio Canada* la 12an de septembro, en artikolo de *Associated Press* pri la tembeoj el brazila Amazonio, en la okcidento de la ŝtato Parao, kiu sukcesis starigi striktajn disponojn por batali kontraŭ *Kovimo-19* kaj ankoraŭ ne estis atingita de la viruso en septembro.

Tiun sukceson ili festis kaj por tio invitis fotiston de *Associated Press*: Grupo de tembeoj armitaj per pafarkoj kaj ĉaspafiloj alvenis

per motorcikloj ĉe ligna pordego blokanta la aliron al ilia vilaĝo. Unu el ili forigis la pendseruron kaj malfermis la pordon. «Vi estas bonvena», diris *Regis Tufo Moreira*, 33-jaraĝa, al la gasto.

Dekoj da indiĝenaj grupoj en Amazonio estis raportintaj al ili pri kazoj de kronviruso alvenintaj, post kiam ili devis vojaĝi al najbaraj vilaĝoj por komerci, aĉeti manĝaĵojn kaj enspezi prokrizajn pagojn de la registaro. Post tiu ĉi rakonto la tembeoj rapide blokis la aliron al siaj tri vilaĝoj *Cajueiro*, *Tekohaw* kaj *Canine* kaj permesis elirojn nur en urĝaj kazoj. Ili ankaŭ limigis la aliron de registaraj sanlaboristoj. Nun kiam la ĉiutagaj nombroj de *Kovimo-19*-kazoj kaj -mortoj malpliigas en la ŝtato Parao, la tembeoj komencas kredi, ke ili eliros la pandemion sen esti trafitaj de la viruso. «Ni ne iris al la urbo, ni ne iris al aliaj vilaĝoj. Ni restis izolitaj. Do ni festas. Ni ĝojas ne havi malsanulojn

ĝis nun» triumfis *Sergio Muxi*, vilaĝestro de *Tekohaw*. En la malfrua posttagmezo de la 9a de septembro, la virinoj de *Tekohaw* kolektiĝis en la komuna kuirejo por kuiri festenon kun grandegaj pladoj da manioko, rizo kaj rostitaj fiŝoj envolvitaj en bananfolioj. Komence de la epidemio, virinoj de la tri vilaĝoj kunvenis kaj decidis viziti ĉiujn hejmojn por eduki la loĝantojn pri la danĝeroj de *Kovimo-19* kaj pri la maniero, kiel la malsano estas transdonita. «Ni decidis krei la grupon por doni pli da informoj al la familioj», klarigas *Sandra Tembe*, 48-jara instruistino, en sia gepatra lingvo. «Unue tre malfacilis, ĉar iuj familioj ne volis izoli sin». Ŝi dankas, ke ĉi tiuj familioj finfine aŭskultis kaj ke ŝia popolo ne devis trakti multajn kazojn de *Kovimo-19*, kiel okazas en aliaj indiĝenaj vilaĝoj. La tembeoj ankaŭ uzis tradician herban infuzaĵon por plifortigi la sanon de vundeblaj kaj maljunaj homoj.

8. La popolo *tembe* estas indiĝena etno de Brazilo el la paraa ŝtato, kun ĉirkaŭ 1 500 individuoj (2010). Ili estas unu el la du grupoj apartenantaj al la historia makro-grupo de la *Tenetechara* (kune kun la *Guajajara*). Ili parolas la tembean dialekton de la tenetehara lingvo, kiu apartenas al la tupi-gvaranaj lingvoj. Nur parto de la membroj loĝantaj ĉe la rivero *Gurupi* parolas sian gepatran lingvon, dum la ceteraj uzas la portugalan aŭ la *kaapor*-lingvon. Ili identigas sin per la termino *Tenetechara*, kiu signifas "homoj", dum la nomo *Tembe* aŭ *Timbé* estis atribuita al ili de najbaraj popoloj. En esperanto ni proponas: "tembeo".

Kiam la suno subiris, *Sergio Muxi* ekstaris kaj kantis kun plejaĝulo ĉe ĝojfajroj. Aliaj membroj de la vilaĝo aliĝis dancante. La sekvan matenon, la vilaĝanoj vekiĝis kaj komencis surmeti kufojn kaj pentri siajn korpojn. Du grupoj konverĝis al la loko de la noktaj ĝojfajroj, kie pliaĝuloj kaj gvidantoj dancis laŭ la ritmo de tradiciaj marakoj⁹. La festoj daŭris horojn antaŭ ol la homoj de *Tekohaw* revenis hejmen por rekomenci sian ĉiutagan vivon¹⁰.

Ni forte esperas, ke la tembeoj plu sukcesis protekti sin de la malsano kaj konservi sian ĝojon ĝis la fino de tiu ĉi jaro kaj eĉ poste.

Aŭtoktonoj el Kanado

La 17an de decembro la Indigenaj Servoj de Kanado (ISC) anoncis 2 477 kazojn de kronviruso inter la indiĝenoj (1,3 milionoj en Kanado), el kiuj 1 218 aldoniĝis. La Unuaj Nacioj de la Prerioj estas la plej forte trafataj, precipe en la provinco Manitobo¹¹, kie la nombro de la kazoj vere eksplodis. Kun 70 ĝis 80%, *Shamattawa*, komunumo situanta je 745 kilometroj nordoriente de Vinipego, estas la plej tuŝita en la provinco.

9. "Marako" ne troviĝas en PIV sed ĝi estas la termino proponita de Vikipedio artikolo parolanta pri perkutinstrumento de Ameriko. Origine ĝi konsistas el seka ŝelo de kukurbo, enhavanta kelkajn ŝtonetojn. Ĝi ankaŭ havas stangeton – gluitan aŭ enmetitan tra bo-
raĵo – kiu funkcias kiel tenilo por ĝin preni mane kaj sonigi per ŝvingo. Nuntempe oni fabrikas marakojn el diversaj materialoj kiel ligno, plasto, ktp. Marako estas uzata kiel ritma muzikinstrumento, plejofte kiel duopo, unu marako por ĉiu mano de marakludanto. La vorto "marako" devenas el la vortoj "majra aka", de la gvarania lingvo, kiu signifas "kapo de supernatura estaĵo".


10. ici.radio-canada.ca/espaces-autochtones/1733333/pandemie-autochtone-indigene-bresil-amazone-tembe.

11. Preria provinco de Kanado inter Ontario kaj Saskacevano, kaj la Nordokcidentaj Teritorioj, la Hudsona Golfo norde kaj Usono sude. (eo-Vikipedio).

En la kebekia regiono Utaveo la aniŝinaba rezervejo *Kitigan Zibi*¹² estis longe ne tuŝita de la viruso. Sed la 18an de decembro oni anoncis du malsanulojn. *Dylan Whiteduck*, estro de la rezervejo *Kitigan Zibi*, tre zorgas pri la pandemio, kiu damaĝas ankaŭ la psikologian sanon de multaj homoj en la rezervejo. Pluraj faktoroj maltrankviligas la komunumon kaj ties estron: la loĝantaro ofte malproksimas de urbaj centroj kaj sanservoj, kaj la kuracado ne taŭgas por ĉiuj bezonoj. Ankaŭ la ĝenerala kirurgo de la Montreala Hospitalo *Notre-Dame*, *Dro Vollant*, inuito, zorgas: Troloĝado kaj troa proksimeco en loĝejoj, malbona ventumado en la hejmoj, limigita aliro al sanservo dekobligas la riskojn de virus-transdono en la indiĝenaj komunumoj kiel *Kitigan Zibi*. 10 ĝis 12 homoj loĝas en la sama domo, foje pluraj generacioj kaj pluraj familioj. Indiĝenoj ankaŭ spertas pli gravajn komplikadojn¹³.

Vakcinado proksimiĝas

La federaciaj responduloj de Kanado jam indikis, ke distributado de unua vakcino povus eki komence de la venonta jaro kaj marĝenigitaj grupoj povus esti inter la unuaj, sed persvadi indiĝenojn fidi la sansistemon, kiu pli frue misuzis ilin por seninfor-



Globforma skuludilo farita per nigrigita kukurbŝelo kaj bambua aŭ ligna tenilo kovrita per kotonaj fadenoj. Donita al muzeo pri la indianoj de la FUNAI en 1994 kaj verŝajne faritaj je la sama dato. El la maranja ŝtato (apud la paraa).

12. La aniŝinaboj estas indiĝena tribaro de suda Kanado kaj norda Usono parolantaj algonkenajn lingvojn kaj entenanta la algonkenan popolon, kiu loĝas en la rezervejo *Kitigan Zibi*. Vidu: eo.wikipedia.org/wiki/Aniŝinaboj kaj eo.wikipedia.org/wiki/Algonkenoj.

13. ici.radio-canada.ca



La ĉefo de la komunumo *Kitigan Zibi*, *Dylan Whiteduck*, zorgas pri la kronvirusa situacio.




Dro Stanley Vollant, inuito el la nacio *pessamit*, kirurgo en la hospitalo *Notre-Dame de Montréal*

me fari medicinajn eksperimentojn, estas malfacila defio. "Ĉi tiuj komunumoj estis viktimoj de trompaj kaj teruraj aferoj en la pasinteco," diris *Arlen Dumas*, Granda Estro de la Asembleo de Manitobaj Estroj. La skeptiko de la indiĝenoj baziĝas sur hororaj rakontoj, diras *Ian Mosby*, helpprofesoro en la Universitato *Ryerson* en Toronto. Estas multaj ekzemploj en la kanada historio de federacie subvenciitaj sciencistoj – aŭ de la registaro mem –, kiuj kondukis medicinajn eksperimentojn sur indiĝenoj. «La problemo estas kontraŭbatali tiun skeptikon meze de krizo, meze de pandemio, kaj provi reakiri tiun fidon», diris *Mosby*. «Ĉi tiuj klopodoj devintus komenciĝi antaŭ 20, 30, 50 jaroj.»

IKEWAN, la ĵurnalo de la unuaj popoloj

Mi finos tiun ĉi artikolon parolante pri la revuo de la asocio *ICRA International*¹⁴, kiu dediĉis sian lastan numeron al aŭtoktonoj kaj pandemioj. Kvankam internacia, tiu ĉi gazeto aperas malfeliĉe nur en la franca. Kvin



paĝojn ĝi dediĉis al la izoliĝo de indianaj triboj en Amazonio, kiuj distanciĝis por fuĝi epidemiojn kaj nian agreseman kaj ekspluateman socion, kies kulturo ŝajnas atingi sian finiĝon. Tiu ĉi artikolo longe demandas sin, ĉu izoliĝo taŭge aŭ ne respondas al tiuj du minacoj. Demando, kiu

nun debatigas antropologojn, ĉar pli oftas aperoj de triboj ĝis nun nekontaktitaj. Ĉu kompleta izoliĝo aŭ ĉu kontrolitaj kontaktoj? La artikolo detale eniras la temon de la pandemioj, kiuj tuŝis la amerikajn indianojn ekde la alveno de la koloniantoj. Ĝia aŭtoro surpriziĝas pri la facileco, kun kiu la hispanoj detruis imperiojn tiom potencajn kiom tiuj de la aztekoj kaj inkaoj, kaj konkeris tutan kontinenton. Oni ofte klarigis tion per la teknologia supereco de la invadantoj kaj la stuporo de la invaditoj, vidantaj diojn en tiuj strangaj alvenantoj. Sed ĵusaj esploroj montras, ke la renkonto kun malsanoj nekonataj, kreantaj tre mortigajn epidemiojn, ludis determinan rolon. La artikolo rakontas plurajn kazojn de triboj ekstermitaj per tiuj kontaktoj kun la ekstero, ofte per simpla objekto donacita aŭ lasita de vizitanto. En alia artikolo oni demandas sin, ĉu la aŭtoktonaj konoj, ĉefe medicinaj, povus helpi nin fronti venontajn pandemiojn. La asocio aparte subtenas la karenoj en Tajlando, ankaŭ forte tuŝitajn de la pandemio. ■



IKEL-informilo n-ro 84

Venonta membrokunveno en distanca (neĉeesta) formo

La lasta membrokunveno de IKEL okazis la 31an de julio 2018 en Lisbono, dum la 103a Universala Kongreso – pri ĝi vi povas legi en *Etnismo* n-ro 102. Laŭstatute nia oficiala membrokunveno devas okazi ĉiun duan jaron, kaj la UK en Montrealo lastsomere estis nuligita. Ĉiukaze, kiam okazas ekstereŭropa UK, ni kutimas ŝovi nian kunvenon al la posta jaro, tiom malmultaj estas niaj membroj kaj estraranoj.

Ĉi-jare la UK devas okazi en Eŭropo, nome en Belfasto, sed la tutmondaj

sankondiĉoj restas dubigaj kaj la ĝisnunaj aliĝintoj relative malmultas. Verdire jam de kelkaj jaroj oni spertas malaltiĝon de la partoprenantaro. Pro tio la IKEL-komitato proponas distancan kunvenon, tute ekster UK: la membroj ĉeestos ĝin per sia komputilo aŭ alia elektronika rimedo. Eble ne temos pri vidkunveno, foje malfacile organizebla, ne nur teknike sed ankaŭ pro tio ke la horoj estas diversaj laŭ la partoprenantoj. Ni povus sendi dokumentojn, lasante tempon por demandoj kaj voĉdonado, dum plurtaga sed preciza periodo.

Tio povus okazi en aprilo aŭ majo de tiu ĉi jaro. Ne hezitu sendi opiniojn kaj sugestojn (e-adresoj de la estraranoj troviĝas sur la paĝo dua).

Kaj, kun via por IKEL tre valora kotizo, bonvolu sendi vian propran e-adreson al nia kasisto, se tio ankoraŭ ne okazis.

Aŭ sciigu, ke vi ne estas kontaktebla elektronike, en tiu kazo ni sendos paperajn dokumentojn kaj voĉdonilon.

Kunvokilo alvenos al vi plurajn semajnojn (almenaŭ tri) antaŭ la membrokunveno. Protokolo aperos en la venonta numero de *Etnismo*. ■

Korekto

Lastnumere, *Etnismo* 105 p. 12, ni anoncis forpason de membro. Leginte la anoncon la edzino atentigis pri la sekvaj korektoj: **Hilary** (ne Hillary) **Chapman** forpasis la 21an de majo 2020 (ne la 20an). La redakto pardonpetas por tiuj eraroj.

Fulmis milito en Alta Karabaĥo/Arcaĥo

Alain Favre



Antaŭ precize kvin jaroj **Etnismo** dediĉis longan artikolon al tiu sudkaŭkaza regiono, delonge pridisputata inter Armenio kaj Azerbajĝano. En tiu artikolo legiĝis la jeno: «Oni povus timi ankaŭ *Blitzkrieg*, fulman militon, flanke de Azerbajĝano por repreni sian ribelan distrikton, okaze de tumulto en la regiono (kiu fakte jam estas) kaj de milita apogo fare de alia lando. Arcaĥanoj tion tre timas, tiom pli, ke la atakoj lastatempe plimultiĝis, cele verŝajne al testado de armenaj defendkapabloj».

Tiu citaĵo ne celas montri, kiom klarvidaj ni estas en **Etnismo**, nek kiel bone funkcias nia kristala globo. Ni nur provas serioze informiĝi kaj konsideri la diversajn eblojn. Tamen, kiel multaj aliaj, ni estis (preskaŭ) surprizitaj pro la rapideco kaj sukceso de tiu milita operaco.

Mallonga resumo de antaŭaj epizodoj

Post jarcentoj da konfliktoj inter armenoj, turkoj kaj persoj, kaj do aparte komplika politika historio, la regiono estis aneksita de la rusoj en 1905 (jaro, en kiu okazis masakro de armenoj

fare de turkoj en la urbo Ŝuŝi); kelkajn jarojn poste, en 1921, malgraŭ protestoj de Armenio pro la fakto, ke armenoj konsistigas 94 % de la loĝantaro de Alta Karabaĥo, tiu distrikto estis atribuita al Azerbajĝano far la sovetia potenco. Kaj kiel ĉie en la nova, ruĝa imperio, la *Pax sovietica* almenaŭ supraj longe efikis. Ne malmultaj armenoj loĝis kaj eĉ kulture aktivis en Bakuo (ĉefurbo de Azerbajĝano) sen renkonti apartajn obstaklojn. Sed, en 1991, Sovetio eksplodis kaj la diversaj respublikoj sendependiĝis kadre de sia oficiala teritorio. Tamen la situacio estis iom aparta en Alta Karabaĥo: jam en la jaro

Virino trairas loĝejon detruitan per azerbajĝana bombado en Alta Karabaĥo, la 10an de oktobro 2020



Foto de armena soldato ĉe la fronto en Erevano, la 18an de oktobro 2020.

1988 ties loĝantoj, kuraĝigitaj de la nova spirito de perestrojko, postulis, ke ilia teritorio iĝu aparta sovetia respubliko. Tio okazigis periodon de tumultoj, kun kontraŭarmenaj pogromoj en kaj apud Bakuo (1990), en kiuj pluraj centoj da homoj mortis.

Sed ni revenu al la ŝlosila jaro 1991: la 2an de septembro Alta Karabaĥo anoncis sian sendependiĝon, konfirmitan de referendumo tri monatojn poste. Azerbajĝanaj respondeculoj decidis blokadon de la ribelanta distrikto, provokante gravan nutraĵan krizon; Armenio helpis siajn sametnanojn, ekis milito, kun masakroj ambaŭflankaj. Post jaroj da konflikto kaj pli ol 30 000 viktimoj batalhalto okazis en majo 1994, sub la egido de la tiel nomata grupo de Minsko (prezidata de Rusio, Usono kaj Francio). Estis klara venko por la armena flanko: kvankam ag-

noskita de neniu ŝtato de UN, la respubliko de Alta Karabaĥo sukcesis pluvivi, en sufiĉe demokratia etoso, ŝanĝante sian nomon al Arcaĥo (tre malnova armena nomo de la regiono) okaze de konstitucia modifo en 2017. Eĉ pluraj nearmenaj, malmulte loĝataj montaraj distriktoj estis konkeritaj cele al protektado de la eta respubliko, kiu tiel formis unuecan blokon kun Armenio.

Renverso de avantaĝoj

Kompreneble Azerbajĝano neniam deklaris sin venkita kaj daŭre planis rekapti sian tutan teritorion. Plurfoje la milito ŝajnis restarti, sed temis pri nelongaj bataletoj, nur por timigi la arcaĥanojn kaj taksu la reagojn de Armenio. Kun la jaroj, la milita potencialo inter la du ŝtatoj pli kaj pli diverĝis. La ĉi-subaj datenoj celas pli bone komprenigi la nunan situacion:

	Loĝantoj (2020)	Malneta enlanda produkto / loĝanto (2018)
Armenio	3 000 000	4 200 \$
Azerbajĝano	10 200 000	15 000 \$

Oni rapide vidas, kiu povas pli trafe interveni kaze de milito. Azerbajĝano ja riĉiĝis dum la lastaj jardekoj, temas pri naftoproduktanta lando, sendependa de baldaŭ tridek jaroj, kiu tiel multe pli facile disponas pri la enspezoj de sia produktado, ol kiam ĝi estis simpla sovetia respubliko. La azer-armeo ege modernigis dum la lasta jardeko, akirante tute novan materialon. Sed tio ne sufiĉas. Kiam oni estas relative eta lando, por rapide venki en milito, necesas havi bonajn aliancinojn, kaj unika ŝanco aperis. Kvankam ŝijaistoj, azeroj estas tre proksimaj al otomanoj, temas pri du tjurkaj popoloj kun ege similaj lingvoj. Kaj ĝuste *Recep Tayyip Erdoğan*, prezidento de Turkio, kies interna politiko ne plu estas tiom sukcesa, ŝatas apelacii al tuttjurkismo (ni vidis, en la eldonista leterro, ke tiu sinteno havas limojn...) kaj, komence de la milito, deklaris, ke li senkondiĉe subtenos Azerbajĝanon en tiu konflikto. Verdire oni nun bone scias, ke Turkio ege helpis jam en la pretigo kaj planado de la milito.

Male Armenio troviĝis tute sola. Multaj armenoj certis, ke okaze de konflikto rusoj rapide intervenos favore al ili. Sed Rusio volis konservi gravan rolon en suda Kaŭkazio per neŭtrala sinteno en tiu konflikto kaj, komerce, Azerbajĝano estas aparte valora partnero, male al la tre eta kaj malriĉa Armenio. La fortaj rilatoj, historiaj kaj kulturaj, inter armenoj kaj rusoj ne vere helpis, ekzistas ja milita interkonsento inter la du ŝtatoj, sed rusaj oficialuloj deklaris, ke Armenio mem ne estis atakita en sia propra teritorio. Eksterlande, kvankam armenaj diasporoj estas potencaj, neniu lando vere apogis Armenion. Male, Britio kaj Hungario faris deklaron favoran al Azerbajĝano. En Francio multaj homoj, interalie influaj politikistoj, forte esprimis sian subtenon al Armenio kaj deziris konkretan agadon,



YEREVANTSI

sed la registaro respondis, ke estante membro de la grupo de Minsko (jam antaŭlonge starigita por helpi al solvo de la konflikto) Francio ne rajtas subteni iun ajn flankon. Alia pli influa membro de tiu grupo de Minsko, nome Usono, tro dronis en kronvira malsano kaj politika kampanjo por serioze interesiĝi pri tiu konflikto.

Tuja najbaro de Azerbajĝano kaj Armenio, Irano estas tre grava rolulo en la regiono. Ĝia sinteno estis ambigua. Entute ĝi emintus favori Armenion tiom pli, ke Israelo de longe havas tre bonajn rilatojn kun Azerbajĝano (kaj interalie spionbazon sur ĝia teritorio), sed en Irano vivas almenaŭ dek du milionoj da azeroj (inter kiuj troviĝas la “supera gvidanto” *Ali Ĥamenej*) – do pli ol en Azerbajĝano mem. Dum la milito averte patrolis iranaj trupoj laŭlonge de la landlimo, sed ili tute ne intervenis en la konflikto.

Drastaj konsekvencoj

Ni ne rakontos tie ĉi la tutan disvolviĝon de tiu milito, kiu ekis la 27an de septembro kaj finiĝis la 10an de novembro per kvazaŭa kapitulaco de Armenio. Ni emfazas la jam aluditan rolon de Turkio, kiu provizis tre efikan


armilaron, interalie aparte mortigajn droneojn, kaj ankaŭ spertajn soldatojn el Sirio kaj Libio, al Azerbajĝano. Oni menciis militajn misfarojn el ambaŭ kampoj, kiel fakte en ĉiuj militoj; Armenio bombis urbojn eĉ sufiĉe for de la militareo. Entute la viktimoj estis almenaŭ 5 000, kun proksimume egala nombro en ambaŭ flankoj, kio tamen montras la fortan decidemon de armenoj – multaj el ili estis ne profesiaj armeanoj sed volontuloj – disponantaj multe malpli efikan armilaron.

Stepanakert, la ĉefurbo de Arcaĥo, estis bombita tutkomence de la milito kaj poste

bombardita per peza artilerio, kiam azerbajĝanaj trupoj alproksimiĝis. El la 150 000 loĝantoj de Arcaĥo, duono rapide forlasis la teritorion kaj rifuĝis en Armenio, ĉefe al la ĉefurbo Erevano. Rapide la vivo iĝis aparte malfacila en la teritorio kaj, la 9an de novembro, la eksa ĉefurbo de Arcaĥo Ŝuŝi, kun siaj katedralo kaj diversaj kristanaj monumentoj, estis kaptita de azeraj trupoj. Laŭ arcaĥa diro: kiu tenas Ŝuŝi tenas la ŝlosilon al *Stepanakert*. La postan tagon oni anoncis la subskribon de paca interkonsento fare de Armenio, Azerbajĝano kaj Rusio. Jen resume ĝiaj ĉefaj punktoj:

Ekzemploj de armenaj ŝtonkrucoj, nomataj ĥaĉkaroj, en la monaĥejo Geghard.

- La nunaj pozicioj de ambaŭ armeoj estas konservitaj;
- La azeraj distriktoj ĉirkaŭantaj Arcaĥon, kiuj estis kaptitaj de Armenio en la 1990aj jaroj, estos redonitaj al Azerbajĝano en tuja estonto laŭ preciza kalendaro;
- La rekonkeritaj partoj de Arcaĥo, interalie la urbo Ŝuŝi, restos en la rego de azeroj;
- Rusaj trupoj garantiantaj pacon restos en la teritorio dum kvin jaroj, kaj poste ankoraŭ kvin pliajn krom se tion kontraŭos almenaŭ unu el la partioj;
- Centro pri pacobservo estos starigita por kontroli la efektivecon de la interkonsento;
- Forpelitoj kaj rifuĝintoj povos reveni al sia loĝloko sub la superrigardo de UN;
- Estos interŝanĝo de militkaptitoj kaj de korpoj de viktimoj;
- La koridoro de *Lachin* iĝos la sola trairejo inter Armenio kaj Arcaĥo, nova vojo de tie al *Stepanakert* estos konstruita evitante interalie la urbon Ŝuŝi;
- Reciproke nova koridoro estos konstruita en la sudo de Armenio mem, ĝi ebligos rektan trapasadon inter la ĉefa parto de Azerbajĝano kaj ĝia aŭtonoma respubliko Naĥiĉevano.



Kompreneble multaj armenoj loĝantaj en lokoj (re)donotaj al azeroj decidis rapide forlasi sian bienon; ili tre ofte bruligis siajn domon kaj nemoveblaĵojn antaŭ ol foriri. Aliaj decidis resti; laŭ seriozaj informiloj kelkaj jam estis senkapigitaj de azeraj armeanoj.

La prezidento-diktatoro de Azerbajĝano, *Ilham Aliyev*, iris kun la vic-prezidentino *Mehriban Aliyeva* (kiu fakte estas lia edzino)

triumfi en la ĵus rekapitata teritorio. Verdire kelkaj enlandaj voĉoj aplombis riproĉi, ke «ni tamen ne finis la laboron». Tio montras, ke Rusio scipovis agi iom favore al la armenoj, sed precize en la lasta momento, tuj antaŭ la tre probable kompleta kolapso de Arcaĥo. Jen versajna decido de la ruzega kaj cinika *Putin*, kiu deziris doni seriozan averton al la armena ĉefministro *Nikol Paŝinjan*,

elektita en 2018, multe malpli rusema ol liaj antaŭuloj kaj tre allogata de Eŭropa Unio. Tre populara ĝis la milito, *Paŝinjan* estas nun konsiderata de multaj armeoj kiel “perfidulo al la nacio”, ĉar li subskribis tian interkonsenton. De tiam manifestacioj kontraŭ li senĉese sinsekvas kaj baldaŭ okazos elektado de nova parlamento. Sed kion povos fari pli “patriota” ĉefministro? Iu ajn milita paŝo fare de Armenio povus konduki nur al plena katastrofo.

Siaflanke ankaŭ Turkio triumfas, ne kaŝante sian gravan rolon en milito, kiu fakte ne vere koncernis ĝin, krom pro ĝia delonga malamo al armenoj. *Erdoĝan* petas, ke turkaj soldatoj kaj ŝtato-ficistoj havu taskon en la pacobservo en Alta Karabaĥo. Imagu loĝanton de *Stepanakert*, kiu paŝas sur strato de sia urbo kaj renkontas turkan, otomanan soldataron... Ĉu en lia/ŝia menso povas veni io alia ol bildoj pri genocido? Tia turka iniciato tute certe celas fortimigi la restintajn loĝantojn kaj tiel apogi la etnan purigadon arde deziratan de la azerbajĝana povo.



Armenaj kaj azeraj flagoj en landlimo.

DAVID STANLEY

Malklaraj - sed precipe malhelaj - perspektivoj

En tiu armistiko nenio troviĝas koncerne la estonton de Arcaĥo. Fakte tio tute normalas, packontrakto povas veni nur post longaj diskutoj inter ĉiuj protagonistoj. Ankaŭ la grupo de Minsko devus partopreni. Sed antaŭe iaspeca “normala” vivo devas restarti. Unue per rekonstruo de detruitaj aŭ forte damaĝitaj urboj, vilaĝoj kaj vojoj, kun samtempa reveno de rifuĝintoj. Sed kiom el la 75 000 foririntaj homoj deziros reveni? Arcaĥo reduktiĝis kaj perdis sian embleman urbon Ŝuŝi, lulilon de armena identeco, ĉefa celo de la malmultaj turistoj en la regiono. Ĉiuj krestoj de la montaroj, kiuj ĉirkaŭas tiun armenan altebenaĵon, estos okupitaj de la “malamiko”. Daŭre cirkuli inter rusaj soldatoj (pri turkaj mi ne plu parolu), ne ĉiam aparte afablaj, memorigas pri periodo, kiun multaj volintus forgesi. Certe, arcaĥanoj delonge kutimas pri ne tute sekura vivo, ili tamen preferus pli liberan estonton. Ĉiuj armenoj havas kuzojn kvazaŭ ĉie en la mondo, kiuj volonte helpas rifuĝintajn parencojn konstrui al si novan vivon, for de enklavo, kiu plej similas karceron, ligitan al la “patrolando” nur per tre mallarĝa umbilika ŝnuro.

Ĉu oni povas imagi repaciĝon inter armenoj kaj azeroj? Kelkaj (tre malmultaj) junuloj kaj artistoj tion esperas, sed tio postulas almenaŭ jardekojn. Gravus por tio pliboniĝo de la rilatoj inter Turkio kaj Armenio, tute ne prognozebla en proksima estonto. En Turkio, iuj gravaj oponentoj al

Erdoğan estas almenaŭ same naciismaj kiel li. Aliflanke, dum Armenio iĝis pli aŭtente demokratia lastatempe, certe Azerbajĝano longe restos tipa diktaturo.

Tio eliminis la opcion krei aŭtonoman respublikon por Arcaĥo kadre de la azera ŝtato. Verdire alia aŭtonoma respubliko ekzistas, temas pri la jam menciita, eksterteritoria Naĥiĉevano; en tiu regiono vivis ĝis antaŭ unu jarcento loĝantaro plejmulte armena. Sed pro turka premo (otomana, azera, tata) armenoj malrapide foriris, kaj la lastaj estis forpelitaj dum la unua milito de Alta Karabaĥo (1991-1994). De tiam ĉiuj armenaj tombejoj, preĝejoj kaj monumentoj estis detruitaj. Oni facile povas imagi saman sorton por Arcaĥo.

Tamen iuj plu proponas aŭtonomion kadre de Azerbajĝano, sed kun internacia garantio, iom simile al la palestina “alta aŭtoritato”. Sed ĉu tiu lasta vere estas sukceso? Verdire la situacio de la armenoj estas entute pli simpla ol tiu de la palestinoj, ĝis nun ne ekzistas akraj politikaj konfliktoj ene de la arcaĥa komunumo. Eble efektivigo de tia statuso estas esplenda, sed ĉu Azerbajĝano tion akceptos?

Francaj senatanoj petis eĉ pli: ili rekte proponis, ke Francio tuj agnosku sendependecon de Arcaĥo. Ja tiu teritorio ne plu estas okupacio de la azeraĵ “bufraj” distriktoj, kio (teorie) ebligis al Armenio pli facilan protekton de la frata teritorio. Ekde nun armena “koloniado”

ne plu ekzistos, male azeroj povos ekloĝi ene de la kaptitaj partoj de Alta Karabaĥo. Kompreneble tia “solvo” indignigis Azerbajĝanon, kaj verŝajne nur tre malmultaj ŝtatoj agnoskus tian sendependecon.

Oni povas esperi, ke la grupo de Minsko pli serioze laboros por trovi akcepteblan solvon al la konflikto, kiom malfacila tio estu. Sed aldoniĝis unuagrada rolanto, tute ne ĉirkaŭirebla: temas pri Turkio, tiom aroganta kaj iniciatoplena ekde kelkaj jaroj: ni pensu pri ĝiaj intervenoj en Sirio, Irako, Libio, orienta Mediteraneo. Enlande la situacio de kurdoj kaj kristanaj malplimultanoj ankoraŭ pli malboniĝis. Kaj eĉ se la nuna prezidento estos forigita aŭ malaperos en la venontaj jaroj, etoso de naciismo kaj maltoleremo al ĉio ne pure “otomana” certe tre longe restos.

Ja lumo fine de tunelo tute ne vidiĝas por la armenoj de Alta Karabaĥo. Kvankam sincera simpatio al ili ekzistas dise en la okcidenta mondo, geopolitikaj kaj komercaj kialoj sufiĉas por pravigi rifuzon de helpo flanke de “moliĝantaj” demokratioj. Eble ĝis la punkto, ke se okazos nova – sed malpli grandskala - armena genocido, plej multaj preferos rigardi aliloken. ■

Katedralo Ghazanchetsots en Ŝuŝi, eksa ĉefurbo de Arcaĥo.



La livona lingvo, ĉu malaperinta, ĉu modelo por revigligo de malaperantaj lingvoj?

Nicole Margot



ZANE ERNSTREITS

Valts Ernštreits

Komence de novembro aperis en *Global Voices* interesa intervjuo de fakulo pri la livona lingvo¹. Ĉar mi nenion konis pri tiu lingvo, mi tuj traserĉis informojn sur la reto. Unue mi legis franclingve kaj nun tradukas: «Iam vaste parolita en Livonio, la livona estas nun estingita». Kaj pri Livonio, denove el la franclingva Vikipedio: «Historia nomo donita al pluraj politikaj entoj situantaj ĉe la orienta Balta Maro kaj kies geografia perimetro (konservante la saman nomon) evoluis laŭ historiaj periodoj». Do la afero ne simplas.

Iom da historio

Laŭ arkeologiaj prifosadoj la nuntempa balta teritorio estas loĝata de 10 000 jaroj. Ĝiaj unuaj loĝantoj estis proto-eŭropanoj. Poste la finnoj instaligis tie antaŭ 3 000 jaroj. Sekve de lingvomiksigo aperis baza lingvo, el kiu naskiĝis la livona kaj la estona. Laŭ estona lingvisto ŝajnas, ke tiam oni parolis kvin finnajn lingvojn, inter kiuj la livonan. Fine de la 12a jarcento la livonoj vivis en vasta areo borde de la maro kaj en la ĉirkaŭo de du latvaj valoj, tiuj de la Daŭgavo kaj de la Gaŭjo². En la 13a jarcento, antaŭ la livoniaj militoj, la livona loĝantaro eble atingis 150 000 homojn laŭ iu finna esploristo aŭ, laŭ aliaj fontoj, limiĝis je 15 000 aŭ 21 000, eble 28 000, en jena distribuo: 10 000 ĝis 12 000

en la valo de la Daŭgavo kaj 5 000 ĝis 6 000 en tiu de la Gaŭjo, kaj 6 000 ĝis 9 000 en la regiono *Metsepol*, orienta parto de la golfo de Rigo. En tiu ĉi epoko la Livona Konfederacio aŭ *Terra Mariana* kunigis plurajn laikajn kaj religiajn ŝtatojn sur la nuntempa teritorio de Latvio kaj Estonio inter 1243 kaj 1561. Tiun ĉi epokon sekvis longa milita periodo, dum kiu la nombro de la loĝantoj duoniĝis kaj poste rekreskis sub sveda regado dum la 17a jarcento. Sekvis la Granda Norda Milito, dum kiu malkreskis la sveda potenco profite al la rusa. Kaj kronikisto de tiu epoko rakontis, ke tiam malmultis livonoj en la livonia regiono dum ili pli multis en Kurlando³. En 1721 Livonion aneksis Rusio, kaj en 1918 la kreo de ŝtatoj Estonio kaj Latvio dividis la “rusan” Livonion inter tiuj du ŝtatoj. Ekde tiam la termino Livonio daŭre uziĝas nur por la teritorio latva inter la Daŭgavo sude kaj la estona limo norde, la balta maro okcidente kaj la latgalia regiono oriente. Notindas, ke Rigo, ekde sia origino, estis la politika ĉefurbo de Livonio, kiu strukturiĝis ĉirkaŭ tiu ĉi urbo fondita en 1201.

Kiu estas la intervjuito Valts Ernštreits?

Li naskiĝis en Rigo en 1974 kaj estas tradukisto, poeto kaj lingvisto, fakulo pri la finn-ugraj lingvoj, kiujn li instruis en la Universitato de Latvio inter 2003

kaj 2008 kune kun la livona, baltfinna lingvo, apartenanta al la finn-ugra lingvofamilio. En 2010 tiu lingvisto defendis sian doktorigan tezon pri “la disvolviĝo de la livona skribo”. Kiel aktivulo de la livona li fondis en 2018 la Livonan Instituton kadre de sia universitato. Lia opinio, tiu instituto, kreita modeste, sen mono kaj sen dungitoj, gravas por Latvio, ĉar livonoj apartenas al Latvio. Unuan fojon Latvio serioze eniras la sciencon finn-ugran mondon. Tiel Latvio montriĝas unu el la malmultaj eŭropaj landoj, kiuj havas indiĝenojn, kvankam latvoj ne kutimas pensi laŭ tiu maniero.

Nuntempa situacio de la livona

La artikolo enkondukas nin en la nunan situacion de la lingvo per kelkaj historiaj linioj: Antaŭ centoj da jaroj la livona estis parolata tra tuta Latvio, sed ĝiaj parolantoj iom post iom asimiliĝis al la ĉirkaŭa kulturo kaj, komence de la 20a jarcento, nur kelkcentoj da latvianoj plu parolis livone, en kelkaj foraj fiŝkaptistaj vilaĝoj de Kuronio³. Sub la reveninta regado de Moskvo (1940-1941 kaj 1944-1991), post 22jara paŭzo, tiuj marbordaj areoj formis la okcidentan limon de Sovetunio kaj estis grandparte okupitaj de militistoj. Aliro al la marbordo estis limigita kaj livonoj ne plu povis fiŝkapti. Multaj forlasis la gepatrajn terojn.

La verŝajne lasta denaska parolanto de la livona, *Griželda Kristiņa*, mortis en

2013 en Kanado, kien ŝi fuĝis en 1944. Oni kutimas konsideri, ke lingvo mortas kun la lasta denaska parolanto, kiel skribis interalie la franclingva, itallingva, hispanlingva kaj germanlingva artikoloj de Vikipedio. La rusa mencias, ke ĝi ne plu uzatas en la ĉiutagaj konversacioj sed plu studatas, kaj la angla realisme raportas pri renaskiĝo de la lingvo kun 40 parolantoj en 2010, kiuj havas nur limigitan konon de ĝi. Kompreneble la latva versio ŝajnas raporti plej proksime al la realo, skribante, ke «la livona lingvo estas aglutina lingvo, preskaŭ estingita, el la grupo de la baltfinnaj lingvoj en la urala familio⁴, unu el la du aŭtoktonaj lingvoj de Latvio kaj la sola, krom la latva, konsiderata kiel la plej malnova loka lingvo kaj protektita de la latva leĝo.» Ĝi aldonas, ke 200 homoj pli malpli lernis la lingvon, ententatan en la listo de Unesko pri la minacataj lingvoj. La artikolo de *Global Voices* raportas, ke post la restarigo de la latvia sendependeco en 1991, la lingvo montris malrapidan revigliĝon, kiam eta nombro da homoj, kun livonaj radikoj aŭ interesitaj pri tiu kulturo, komencis lerni kaj promocii ĝin. Tiuj parolantoj malmultas (nun ĉirkaŭ 250), sed ili ekzistas, substrekas la intervjuito.

La Livona Instituto

Valts Ernštreits, direktoro de la Livona Instituto, opinias, ke la mondo povas profiti de la livonaj spertoj ĉar, esplorante la diversajn aspektojn de la livon-

1. “Ni havas strangan destinon” intervjuo far *Will Mawhood*. <eo.globalvoices.org/2020/11/9760/>

2. Tiuj du riveroj fluas en la regionoj Livonio (*Vidzeme* en la latva) kaj Latgalio.

3. Kurlando, Kuronio aŭ Kuronujo (germane *Kurland*, latve *Kurzeme*), estis ĝis la 13-a jarcento la vivoregiono de la balta popolo kuronoj, livonoj vivis norde de Kurlando. La kurona popolo asimiliĝis al la latva kulturo dum la 17a jarcento. Substrato de la kurona lingvo, balta idiomoproksima al la oldprusa, plu restas en latvaj dialektoj de la centro.

4. La uralaj lingvoj estas baza grupo, kiu dividiĝas en du grandajn familiojn, la finn-ugran okcidente kaj la samojedan oriente.



Informtabulo en la kabo Kolka, latve, livone kaj angle.

lingva situacio, eblas lerni, kiel endanĝerigita lingvo povas rezisti aŭ postvivi en same malfacilaj kondiĉoj. Kompare kun aliaj indiĝenaj popoloj, kiuj ankaŭ vivas en danĝero de malapero, livonoj suferas pri aparta problemo: manko de difinita kultura areo. En la 19a jarcento du miloj kaj duono da livonoj plu parolis la lingvon, ege malmulte, apenaŭ la sama nombro kiel kutima vilaĝa loĝantaro, kaj du mondmilitoj komplete detruis la marbordon, la tiaman livonparolantan areon. Kaj malgraŭ tio la livona plu ekzistas.

Post sia modesta kreo en 2018, la instituto nun mastrumas

tri projektojn, kaj naŭ personoj konsistigas la kunlaborantan teamon. Unu projekto estas kolekti livonajn toponimojn, pli precize toponimojn en la livona lingvo kaj ne de livona origino, kaj tion oni faras reirante foren en la pasintcon, ne nur en la livonan marbordon, kiun oni nun konsideras kiel livonlingvan parolan areon, sed ankaŭ, ekzemple, en la regionon de Rigo. La instituto volas scii, kiel iuj lokoj estis nomataj en la livona. «Kaj ni uzas diversajn metodojn por fari tion, uzante ciferecajn tekstarojn, eltirante el ili ekzemple folkloran materialon kiel popolajn fabelojn de diversaj kolektoj. Ekzistas interalie ko-

lekto el diversaj hejmaj objektoj, pri kies origino oni skribis livonlingve. Kaj ni ne nur kolektas tiajn informojn, sed ankaŭ ligas ilin al aliaj oficialaj latvaj datumbazoj pri ties geografia situo. Tio ebligas al ni ekzemple starigi livonajn informtabulojn. Tiel ni povas proponi oficialajn livonajn versiojn de latvaj toponimoj. Do se iu volas ekzemple starigi informtabulon por la vilaĝo *Kolka* (ĉe la livona marbordo) kun ĝia livona nomo *Kūolka*, oni jam havas fonton kongruan kun la reguloj de la norma livona lingvo.»

Interreto kaj minoritataj lingvoj

Interreto nun influas la tutan mondon, sed ĝi aparte gravas por anoj de minoritataj lingvoj, kiuj povas legi sur ĝi diversajn informojn, spekti filmojn en sia lingvo aŭ tutsimple renkonti samlingvanojn por dialogi, kio ofte malfacilas. Tio aparte veras por livonoj, kiuj perdis sian teritorion dum la kvindekaj jaroj kaj por kiuj malfacilas renkonti unu la alian por simpla konversacio. Sed ekzistas danĝeroj pridiskutindaj. Ekzemple aktivuloj de la samea



lingvo (ankaŭ finn-ugra) prilaboras aŭtomatan tradukilon por sia lingvo, sed nur por tradukado el la samea, ne al la samea. Povus esti vere bone havi instrumenton por traduki de lingvo al alia, se la tradukilo proponus bonan tradukon, sed se ne, vi povas subite inundi la lingvon per multaj vortoj aŭ esprimoj de malalta kvalito, eĉ eraraj, kaj tiel fuŝe influi la lingvon, tiun vivan organismon, per speco de malsano. Kaj fine, provante savi la lingvon, vi murdas ĝin alimaniere. Ĉar homoj pensas, ke la tradukilo proponas lingvan modelon kaj ili ekuzas erarojn. (Vidu samnumere en *Koncize el...* "Arpitanio: La lingvo ekhavas sian aŭtomatan tradukilon.")

En la dua parto de la intervjuo *Valts Ernštreits* respondas pri la interreta fontmaterialo por lerni la livonan: Ekzistas la retejo <livones.net>, fejsbukaj kaj jutubaj paĝoj por instrui la livonan je elementa nivelo. Tio devos sufiĉe rapide pliriĉiĝi. Iuflanke disvolviĝos en la instituto instrumentoj por pli bona esplorado de la livona kaj pli bona kolektado de datumoj en la livona. Sed aliflanke oni konscias, ke unu parto de la celgrupo estas la livona komunumo, kiu bezonas instruadon, kaj tio necesigas labori en ambaŭ direktoj, proksime interligitaj, ĉar oni ne povas instrui la livonan sen ĝin esplori kaj oni ne povas esplori la livonan sen lingvaj konoj. La ideo efektive estas, ke oni kreas ion por la tuta socio, ke ĉiuj ĉi instrumentoj povas esti uzataj por lernado kaj subtenado de la livonaj lingvo kaj kulturo, ekde mapoj en la livona. Tiu ĉi projekto venas el tiu toponima vortaro nun prilaborata. Parto de ĝi estas kolekto de teksto.

La programo *Tava Klase* (Via Klaso)

Tiu ĉi programo unuafoje disponigas instruadon de la livona

al la tuta lando, eĉ se nur je enkonduka nivelo. Ideo pri ĝi ekaperis preskaŭ hazarde, danke, se oni povas tion diri, al la kronvirsia pandemio, kiu devigis fermi la lernejojn. La Ministerio pri edukado pretigis projekton pri televida instruado nomita *Tava Klase* kaj ŝovis la livonan en la instruprogramon. Sed neniu demandis, kiu povos fari tion en tre mallonga tempo. Ĉiumaniere tiu ĉi oferto ne povis resti senresponda. Oni antaŭvidis sep lecionojn dudekminutajn, kiuj nur sufiĉis por bazaj konoj pri la livona kaj kiuj estis konstruitaj en malpli ol du horoj! Je la unua leciono oni komprenis, ke tiu formulo plu daŭros, ke gravas labori serioze, malgraŭ la limigita tempo kaj la mankanta mono. «Estis komplike, sed ni devis elturniĝi.» Por la kutimaj instrufakoj, kiel matematiko, ŝtataj aŭ fremdaj lingvoj, ekzistas profesiaj instruistoj, kiuj plentempe laboras, la instruado pli facilas ol por la livona kaj por ĉiuj minoritataj lingvoj. Sed la surreta instruado estas alia. Ne eblas instrui same kiel en la klasĉambroj, kaj multaj instruistoj, kiuj kunlaboris al la projekto *Tava Klase*, ne konsciis pri tio. Necesis konsideri la temojn, ekzemple ne uzi tiun de la pandemio aŭ aktualajn temojn, por ke la kurso estu uzebla ankaŭ dum sekvaj jaroj, kaj konsideri celgrupon pli vastan ol nur lernejanon kaj homojn en la eduka sistemo, por ŝpari resursojn.

Tiu instrua kursaro plengigas ian vakuon. «Ekde tiam ni komencis pensi vere serioze pri eniro en la latvan ŝtatan televidon kun elsendaro pri la livona historio». Ekzistas jam dokumentaj filmoj pri la livonoj, sed ili estas sufiĉe emociaj. Male, tiu elsendaro devas esti eduka. La ideo estas montri la rilatojn inter la livona historio kaj la latva.



Ekzemple la konstruado de Rigo estas ankaŭ evento en la livona historio. Necesas doni la livonan perspektivon eĉ al bone konataj eventoj. Oni volas montri ne nur bonajn kaj belajn aferojn, sed ankaŭ problemojn, ekzemple pri la malpermeso uzi livonajn toponimojn en regionaj gazetoj, pri la morto en la malliberejo de *Ventspils* de la livona patrioto *Uļi Kīnkamāg*, arestita en 1932 pro siaj konvinkoj de livona patrioto. Necesas montri la tutan bildon, montri, ke livonoj havas sian propran vidpunkton pri iuj aferoj, ke ekzistas eventoj, kiuj povas ne gravi por Latvio, sed estas esencaj por la livonoj, tiuj indiĝenoj de Latvio. La kerna ideo de la elsendaro estas prezenti la livonan historion al la latva publiko, por ke ĝi pli bone komprenu, kial la livona gravas. Antaŭ nur 15 jaroj latvoj ja eĉ ne konis la diferencon inter livonoj kaj, ekzemple, homoj el *Bauska*, urbeto en la suda Latvio. Apud baza kono de la lingvo, la ideo estas montri samtempe la komunajn kaj la diferencojn inter livonoj kaj latvoj. Oni devas eviti prezenti tion kiel en bestĝardeno; preferindas konsciigi, ke kono pri la livona kulturo gravas por latvoj. Ekzemple la lasta epizodo ne montris la livonian marbordon sed lokojn, kiujn Latvio heredis de livonoj en Rigo, ĉirkaŭ la rivero Daŭgavo (en la centro kaj sudo de Latvio), kaj folklorajn kantojn. ■

La poemaro "Trilium" ricevis la literaturan premion de la Asocio pri Finnugra Literaturo kaj la Programo pri Parencaj Popoloj en la kategorio poezio.

Sekve el...

🔊 Francia Gujano - Ormonto resurektis.

Dum la lastaj jaroj ni plurfoje parolis pri tiu grandega projekto, kiu koncernas 40 km² de la teritorio de tiu transmara departemento de Francio, parto de la baseno de Amazono. Temas pri giganta subĉiela orminejo, kiu ne nur detruos la praarbaron sed ankaŭ poluos la riverojn de granda parto de la departemento, tute proksime al du naturaj rezervejoj kaj diversaj lokoj loĝataj ĉefe de indianoj. En la numero 103 de **Etnismo**, ni ĝojis pri la decido de la financa ministerio de Francio (junio 2019) nuligi tiun projekton *Montagne d'Or*, tamen dubante pri la definitiveco de la dekreto. Pri tio ni pravis: la 24an de decembro 2020 la administra tribunalo de *Cayenne* (ĉefurbo de Gujano) nuligis la ministerian decidon kaj petis plilongigon de la koncesioj. La ministerio havas ses monatojn por tion agnoski, kaj la du koncernataj kompanioj povus peti pliajn 25 jarojn por ekspluati la valoran metalon... Bone informita sed malmulte konata franca revuo ne hezitis publikigi, jam antaŭ la verdikto, ke ofte la registaro produktas dekretojn facile atakeblajn, eĉ sciigante laŭbezone al la “kontraŭa” parto, kiel ilin ataki. Intertempe *Macron* pretendas doni lecionojn al *Bolsonaro* por savi Amazonion... Dume, ambaŭflanke de la landlimo, indianoj pli kaj pli perdas terenon kaj pli kaj pli ofte sin mortigas (vidu **Etnismon** 98, kaj la fenomeno de tiam ankoraŭ plifortiĝis) aŭ iĝas viktimoj de diversaj ekspluatantoj de la iama “verda infero”... sen paroli pri iu nun tre konata viruso, kaŭzo de aparte multenombraj viktimoj en tiu regiono. / AF

🔊 Nov-Kaledonio/Kanakio - Sendependado alproksimiĝas.



La situacio en tiu transmara, pacifika teritorio de Francio delonge estas konflikta inter la du ĉefaj grupoj, tio estas kanakoj (melaneziaj praloĝantoj) kaj francdevenaj koloniantoj – vidu la dosieron en **Etnismo** 99-100. Post jaroj da preskaŭ intercivitana (interetna) milito, interkonsento estis atingita en 1988, kiu donis sufiĉe vastan aŭtonomion al la teritorio, dividante ĝin en tri provincojn kun multaj kompetentoj. Sur la tuta teritorio regas la kongreso, kiu devenas el la provincaj konsilioj. Ankaŭ ekzistas tria senato por indiĝenaj demandoj (identeco, kulturo, komunaj bienoj...). Tiu interkonsento antaŭvidis balotadojn pri la statuso de la teritorio (konsiderata kiel malkolonienda fare de UN – kio ne nepre signifas sendependigenda). Tiu nova statuto por la franca insularo havis pozitivajn efikojn – almenaŭ ne plu estas interna milito – sed multaj kanakoj plendas pro manko de rimedoj por defendi siajn rajtojn kaj atingi pli bonan socian statuson. Interalie pro tre longaj disputoj ĉirkaŭ la voĉdonrajto, unua referendumo okazis nur en 2018; al la demando «ĉu vi deziras, ke Nov-Kaledonio aliru plenan suverenecon kaj iĝu sendependa?», 56,67% de la voĉdonantoj respondis nee. Laŭstatute la kongreso rajtis peti novan referendumon, kiu okazis la 4an de oktobro 2020

(kun iom da malfruo pro la Kovimo-19 pandemio), kaj ĉi-foje la ne-balotiloj malpliigis al 53,26 %. Oni rajtos organizi novan referendumon en 2022 kaj, se tiu tendenco konfirmiĝas, la “jes” kaj “ne” riskas esti tre proksimaj, kun eventuala venko de la sendependistoj. Kanakoj pli kaj pli bone organiziĝas, inter 2018 kaj 2020 la partopreno en la voĉdonado kreskis de 81% al 85,7%. Facilas imagi la problemojn, se ambaŭ partioj atingos tre proksimajn rezultojn, kun akuzoj pri fraŭdoj, “aĉetitaj” aŭ “truditaj” voĉdonoj... Ni eble revenos al iaspeca milito tiom pli, ke el la tri provincoj du estas jam de 2018 favoraj al sendependiĝo. Multe pli loĝata kaj ĉefe de eŭropidoj, tiu de Numeo (ĉefurbo de la teritorio) venkis la “lojalistojn”.

Sendependiĝo de Nov-Kaledonio/Kanakio estus terura bato por Francio. Polinezio riskus rapide sekvi la saman vojon, tiel Francio interalie ne plu estus la dua lando en la mondo pri mara areo, ĝia influo kaj “grando” draste reduktiĝus, ne nur en Pacifiko. Ĝis nun la pariza registaro ne bone scias kiel reagi, tiom pli, ke okazas nun grava konflikto en la insularo ĉirkaŭ ekspluatado de nikelo. Tutcerte diskutoj rapide okazos, iuj jam antaŭvidas rilaton de “suverena asociiĝo” inter Nov-Kaledonio kaj Francio aŭ eĉ Eŭropa Unio./ AF

Koncize el...

Arpitanio: La lingvo ekhavas sian aŭtomatan tradukilon.

En *Etnismo* 103 vi povis legi tutan dosieron pri la arpitana/francprovenca lingvo, parolata en areo, kiu kovras partojn de Francio, Italio kaj Svislando; en la sekva numero aperis detalita artikolo pri la lingvo-ilaro *Apertium*, kiu sin dediĉas interalie al minoritataj lingvoj. Dum la jaro 2020 estis ellaborita tradukilo por la paro franca-arpitana (ambaŭdirekte), sub la direkto de *Hèctor Alòs i Fons*, membro de la *Apertium*-skipo. Estis tre granda laboro ankaŭ por la lingvisto *Dominique Stich*, kiu antaŭ dudeko da jaroj doktoriĝis per ellaborado de nova skribmaniero por tiu tre disdialektiĝinta lingvo, kaj por *Alain Favre*, savoja parolanto de la arpitana. La elekto de “moderna” terminologio kaj ankaŭ de verbaj formoj troviĝis inter la plej tiklaj punktoj kaj aparte ŝvitigis la kunlaborantojn, ĉefe en tre varma somero (kaj foje ankaŭ pro Kovimo-19!). Kompreneble la tradukilo estos plibonigata laŭ sugestoj de uzantoj, sed entute ĝi jam funkcias sufiĉe kontentige laŭ pluraj bonaj konantoj de la lingvo, interalie la respondeculo pri la arpitana Vikipedio. Se vi havas konojn pri latinidaj lingvoj, vi povas provi tiun tradukilon; la uzata skribmaniero de la arpitana, nomata ORB de ĝia kreanto, estas de etimologia tipo, ĝi sufiĉe proksimas al tiu de la franca, de la okcitana (skribmaniero IEO) kaj ankaŭ de la kataluna. Sed ne provu prononci la vortojn kiel en unu el tiuj lingvoj, vi plejofte ne estus komprenata! Vi do povas facile trovi tiun tradukilon en la retejo de *Apertium*, se ne iru rekte al:

<https://apertium.org/index.frp.html?dir=fra-frp#translation> / AF

Vaŭda Arpitanio: Surretigita vortaro. Ja nova tradukilo ege helpas la arpitanlingvanojn pli bone komuniki inter si. Sed forta disdialektiĝo malfaciligas la komunan interparoladon, ĉefe, ĉar iuj preferas resti je nura dialekta lingvopraktiko. Kompreneble por supervivi lingvo bezonas unueciĝon; uzado de tuteca lingvo pli imponas kaj necesas por reprezenti la lingvon. Malgraŭ tio la arpitanlingvanoj ne povas neglekti la dialektan nivelon de la lingvo, ĉar tie kuŝas la vortara riĉeco, la aŭtenteco de la lingva praktiko kaj de la elparoloj. Feliĉe la superdialekta ortografio ORB ebligas legi kaj skribi tekstojn de la tuta lingvo sed, kiel dirite, ĝi ne donas prononcinformojn, kaj por lerni la lingvon oni devas eki el unu el ĝiaj variantoj.


En Svislando, pli precize en Romandio, en la vaŭda kanto, malmultas la arpitanparolantoj, kaj kiel la livonanoj, pri kiuj vi legis en tiu ĉi numero, neniu el ili parolas la lingvon denaske, ĉiuj devas ĝin lerni. Por tio kontentige helpas ilin bona gramatiko, vortaro kaj multegaj registraĵoj. Antaŭ kelkaj jaroj *Jean-François Gottraux* registris iun el la plej bonaj parolantoj de la lingvo, *Pierre Devaud*, dum li legis la vortaron. Fine de la lasta jaro, *Pierre-Alain Poletti*, respondeculo de grupo okupiĝanta pri la aktualigo de la vaŭdlingva vortaro, surretigis tiun registraĵon, kiun vi povas legi kaj aŭdi je la sekva adreso: <dicopatoisvd.ch>. La vaŭda skribo relative facile legeblas, ĉar parte etimologia parte fonetika, sed la aŭdebleco de la vortoj utile kompletigas la skribon pri la ĝusta elparolo. Tiun vortaran registraĵon kompletos longa listo kun novaj aŭ forgesitaj vortoj. / NM



Flandrio: Mortis Willy Kuijpers, fama aktivulo por minoritataj popoloj. Naskita en 1937, *Willy Kuijpers* eniris politikon en 1970. Li plurfoje estis deputito kaj senatano en Belgio kaj membro de la Eŭropa Parlamento inter 1984 kaj 1989, reprezentante la flandran nacian partion *Volksunie*. Li tre interesiĝis pri aliaj popoloj kaj iris defendi ilin surloke; ekzemple li estis arestita kaj poste forpelita de Hispanio en 1975, post subteno al la eŭska popolo kaj publika elmontrado de la (tiam malpermesita) eŭska flago. Li apogis aktivulojn interalie en Katalunio, Korsiko kaj greka Makedonio, ne timante policistojn kaj sekretajn agentojn de la koncernataj ŝtatoj, kiuj ĉiam sekvis lin dum liaj vizitoj. En 1987, li sukcesis adoptigi far la Eŭropa Parlamento rezolucion favoran al minoritataj lingvoj kaj kulturoj. Tiu rezolucio estis la bazo de la Ĉarto por regionaj kaj minoritataj lingvoj, adoptita en 1992 de la Konsilio de Eŭropo, nun subskribita kaj ratifita de multaj ŝtatoj (bedaŭrinde ankoraŭ ne ĉiuj). *Willy Kuijpers* finis sian politikan karieron en 2012 kiel urbestro de *Herent* (flandra Brabanto). Novembre de 2020 li mortis pro Kovimo-19. / AF

Malfermiĝis Nacia Centro por revivigo de la ajnua¹ kulturo

KIMURA Goro Christoph²



La 12an de la sepa monato 2020, pro kronviruso tri monatojn post la originala plano, malfermiĝis en la urbeto *Siraoi*, sur la nordjapana insulo *Hokkaido*, “*Upopoy*: Simbola areo de etna kunvivado”. Iom nebula nomo, sed fakte temas pri nacia centro por revivigo de la ajnua kulturo. Ĝi konsistas el ĉefa parto, la Nacia Ajnua Muzeo mem, el vilaĝeto kun tradiciaj domoj, el manlaborejo, kie oni povas vidi kaj provi tradician skulptadon ktp, el halo por sperti ajnuajn dancojn kaj aliajn kulturajn prezentaĵojn kaj el studejo. Sur tiu tereno antaŭe staris multe pli modesta ajnua muzeo, fondita de ajnuoj mem. La ŝtato transprenis tiun privatan muzeon kaj

rekonstruis ĝin kiel eron de pli vasta koncepto.

La ideo de tia loko, kie la ajnua kulturo povas esti flegata kaj evoluigata, ekzistis jam de longe. Sed kial ĝi realiĝis ĝuste nun? La dato de la malfermo klare montras, kial la ŝtato ekinteresiĝis pri tiu projekto: la Olimpikaj kaj Paralimpikaj ludoj, kiuj estis planitaj okazi en la somero 2020 en Tokio (prokrastitaj pro la kronviruso al 2021).

Unue temas pri “politika ĝusteco”. Oni ja vidis en antaŭaj olimpikaj ludoj, ke indiĝena kulturo estis prezentita dum la malfermo kaj je aliaj okazoj. La japana registaro volis montri al la mondo, ke Japanujo ne postrestas rilate al tiu “tutmonda normo”. Due, kaj eble pli grave por la registaro, ĝi celis krei turisman

La muzeo, en kiu laboras ajnuoj, klopodas teni la karakteron de muzeo de kaj por ajnuoj mem.

allogaĵon en norda Japanujo por venigi en- kaj eksterlandajn turistojn. La ministro pri lando, infrastrukturo, transporto kaj turismo, kiu vizitis la muzeon post la malfermo, diris, ke li esperas, ke ĝi iĝu “eksplozilo por turismo”. Tiu iom tro honesta eldiro kolerigis ne malmultajn ajnuojn. Ajnua skulptisto diris, ke li sentas sin kiel “ornamaĵo de kristnaska arbo”, kiun vendejoj utiligas por komercaj celoj.

Aliflanke, la muzeo, en kiu laboras ajnuoj, klopodas teni la karakteron de muzeo de kaj por ajnuoj mem. Ĝi deklaris la ajnuan lingvon kiel unuan lingvon, kaj priskriboj en la ekspoziciejo estas en tiu etna lingvo plej supre prezentitaj. La evoluo de la nova muzeo kaj la utiligado de la tuta areo montros, ĉu ĝi iĝos vere centro por revivigi la longe subpremitan kulturon de la ajnuoj, aŭ nur “simbola” loko por prezenti la ajnuan tradicion al turistoj. Ni esperu, ke la unua eblo okazos. ■

1. La artikolo uzas „ajnuo” kiel etnonomon, sekvante la decidan de la redakcio de Revuo Orienta (Japana Esperanto-Instituto). Ĝis nun oni uzis ankaŭ „aino”. „Ajnua” pli kongruas kun la etnonomo en la ajnua lingvo kaj estas ankaŭ rekomendata en PIV.

2. Alia artikolo pri la ajnuoj, verkita de la sama aŭtoro, aperis en 2009, *Etnismo* no 84 p. 29-30: “Novaj evoluoj en la japana aino-politiko”. www.etnismo.org/arkivo/Etnismo_84.pdf

Subpremo plene trafas Internan Mongolion

Alain Favre

Ne multaj scias pri tiu teritorio, kiu iĝis oficiale ĉina en 1947. Mongoloj ofte preferas uzi la terminon “Suda Mongolio”. Geografie tio ne tute ĝustas, tiom pli, ke la plej orientaj distriktoj de tiu regiono estas eĉ pli nordaj ol la alia Mongolio – tio estas la sendependa ŝtato, kies ĉefurbo estas Ulanbatoro.

Administracie Interna Mongolio estas unu el la kvin aŭtonomaj regionoj de la Ĉina Popola Respubliko. Ĝia teritorio estas tre vasta, kun 1 183 000 km²; krom al pluraj aliaj ĉinaj provincoj en la sudo kaj oriento, ĝi najbaras en la nordo al Mongolio kaj Rusio. Sed ĝia loĝantaro estas malgranda laŭ ĉinaj kriterioj, tio estas 25 milionoj da homoj. El ili nur 17 % estas mongoloj, do iom pli ol kvar milionoj. Tamen tio jam estas pli ol la 3 100 000 loĝantoj de la respubliko Mongolio, kaj la malpli ol 250 000 burjatoj de Rusio. De longe la hanoj (ĉinetnanoj) estas tre multaj en Interna Mongolio, ĉirkaŭ 80 %, sed finfine la mongoloj, kvankam evidente minoritataj, demografie ne plu perdas terenon, male. Aldone ili restas tre ligitaj al siaj lingvo kaj kulturo. Kompreneble, same kiel en la aliaj “aŭtonomaj” regionoj, ĉiuj influhavaj gvidantoj de la loka komunisma partio estas hanoj.

Interna Mongolio ne tre allogas sudulojn, kun siaj stepoj, Gobia dezerto kaj montaroj. La



la regiona registaro de Interna Mongolio promulgis lastaŭguste leĝon, kiu igas eĉ malplia la uzon de la mongola en la lernejoj de la regiono. Edukiĝi tute en la mongola eĉ nur je la baza nivelo ne plu eblas. Multaj studobjektoj devos esti instruataj en la ĉina. Tuj manifestacioj kaj bojkotoj okazis.



Administracie Interna Mongolio estas unu el la kvin aŭtonomaj regionoj de la Ĉina Popola Respubliko.



Homoj en Ulanbatoro (ĉefurbo de Mongolio) manifestacias antaŭ la ministerio pri eksterlandaj aferoj por denunci la devigan hanigon de la edukado en Interna Mongolio (Ĉinio).

ANAND TUMURTOGOO / REUTERS

klimato estas tre kontinenta, kun aparte longaj kaj malvarmaj vintroj. De longe mongoloj al kutimiĝis, sed hanoj ofte suferas, eble pro tio amasa enmigrado en la teritorion ankoraŭ ne okazis. Ĉinoj koncentriĝas en urboj, interalie la ĉefurbo Hoĥoto kaj la verŝajne ankoraŭ pli loĝata Baŭtoŭo (la du urboj, sufiĉe interproksimaj en la centro de la teritorio, havas po iom pli ol 2 500 000 loĝantojn).

Kompreneble mongoloj pli oftas en la kamparo; multaj havas brutojn, eble ankaŭ pro tio hanoj foje diras, ke la lokanoj parolas “bestan lingvon”. Inter la aliaj etnaj grupoj, kompreneble ĉiuj tre minoritataj, oni trovas evenkojn, koreojn kaj manĉurojn.

Kvankam agrikulturo, praktikata ĉefe de anoj de minoritataj etnoj, ne malgravas en la teritorio, industrio de longe prosperas. Al tre disvastiĝinta karbo-ekspluatado aldoniĝis minejoj, kie oni eltiras maloftajn metalojn (berilion, niobon kaj zirkonion). Apud Baŭtoŭo troviĝas la plej granda minejo en la mondo de raraj teroj, unuagrada riĉaĵo de Ĉinio. En tia medio, la kemia kaj teksta industrioj bone disvolviĝas.

Plej prestiĝe, en la Gobia dezerto, precize en *Jiuquan* troviĝas la unua kaj plej grava spacbazoj de Ĉinio, el kiu foriris interalie la unuaj ĉinaj spacflugoj en la ŝipoj *Shenzhou*.

Oni do komprenas la gravecon de tiu regiono por Ĉinio. Aldone temas pri landlima teritorio, kies historiaj loĝantoj pli parencas al homoj el najbaraj landoj. Oni povus aldoni, ke la rilatoj inter hanoj kaj mongoloj ne ĉiam glatis laŭ la jarcentoj. Mongoloj ne estas facile submetiĝema popolo. En la 1990 jaroj, kiam iomete malstriktiĝis la reĝimo (eble por allogi la eksteran mondon, post la teruraj okazaĵoj de 1989), fondiĝis Komitato por Defendo de la Mongola Kulturo, kiu poste fariĝis Demokrata Alianco por Suda Mongolio. Inter ĝiaj celoj estis lukto kontraŭ la hana kolonizado. Oni facile imagas la reagon de la aŭtoritatoj: homoj estis enkarcerigitaj kaj aliaj sukcesis fuĝi eksterlanden. Kompreneble la premo ne malaperis, male. Pli kaj pli la ĉina lingvo eniris la edukan sistemon kaj la administracion; laŭ kontrolendaj fontoj, tre malfacilas doni mongolan nomon al novnaskito, multaj budhismaj temploj kaj

monaĥejoj estas fermitaj. Enkarcerigoj kaj eĉ murdoj de aktivuloj multiĝis.

Tamen publikaj protestoj plu ekzistas. Kuraĝigite de la malmulteco de reagoj en la mondo rilate la teruran mistraktadon de uĝuroj kaj de la preskaŭa forgeso pri la tibeta problemoj, la regiona registaro de Interna Mongolio promulgis lastaŭguste leĝon, kiu igas eĉ malplia la uzon de la mongola en la lernejoj de la regiono. Edukiĝi tute en la mongola eĉ nur je la baza nivelo ne plu eblas. Multaj studobjektoj devos esti instruataj en la ĉina. Tuj manifestacioj kaj bojkotoj okazis fare de gepatroj kaj studentoj. Peticioj estis subskribitaj, ili sukcesis aperi (kvankam mallonge) sur sociaj retoj. Sed la loka registaro reagis per sendo de policanoj al la lernejoj kaj en la hejmojn, kie gepatroj estis devigitaj subskribi, por ne perdi la laborpostenon, engaĝiĝon akcepti la efikojn de tiu leĝo. Rekompenco de 1000 juanoj estis promesita al tiuj, kiuj povas helpi retrovi manifestaciintojn. Jen kiel oni estigas “perfektajn civitanojn” en tiu lando. Imagi, ke tiom fia politika sistemo povos longe daŭri, tio estas senesperiga ne nur por Ĉinio sed ankaŭ por la tuta homaro. ■